# Aŭstraliaj Esperantistoj

## Novaĵletero de Ĉiuj Aŭstraliaj Esperantistoj

**RETADRESE AL ĈIU ESPERANTISTO EN AŬSTRALIO, NOVZELANDO KAJ PETANTOJ**

**Redaktoro Roger Springer Provlegita de Franciska Toubale**



PLENUMITA 04/07/2024 sescentnaŭdekkvara eldono (unua eldono 26/09/2011)



**Subtenu vian Novaĵleteron**

Sendu novaĵojn, leterojn, fotojn, informojn al Roger Springer rogerspringer@tpg.com.au;

**La limdato por sendi kontribuaĵon al AE estas mardo en la vespero. Merkredo estas tro malfrua .**



**Pasintaj „Aŭstraliaj Esperantistoj“ korektitaj atingeblas je la suba adreso**
Ctrl+klaku la veran ligilon) http://aea.esperanto.org.au/australiaj-esperantistoj/?lang=eo
Ĉirkaŭ unu semajnon post la ĝenerala elsendo, la korektitaj kopioj estas sendataj al AEA. (Sen #)

# AEA-estrarkunveno Ĵaŭdo, la 27-a de junio 2024

Ĉeestis: Jonathan Cooper, Heather Heldzingen, Joanne Johns, Sandor Horvath, Terry Manley, Caroline Turner, Petro Danzer

## (1) Somerkursaro 2025

La preparado daŭras.
Hoan el Vietnamio , kiu instruis en januaro en Ballarat, nun ja refoje venos por instrui en Adelajdo en januaro 2025
Trevor Steele estos la alia instruisto.
Nia limdato por informi St. Ann's pri la "finaj" ciferoj de la partoprenantoj estos la fino de oktobro
.... Granda defio por reklami ke almenaŭ 40 homoj partoprenu.
Bonvolu helpi.
La informo pri la somerkursaro 2025 estos sur nia retejo. Bonvolu registru kaj reklamu inter viaj amikoj
Dum la venonta estrarkunveno ni fokusos sur la reklamado de nia somerkursaro
.... Kaj ĉiu klopodas prezenti novan ideon por allogi eblajn partoprenantojn.

## (2) Esperanto Domo en Melburno

Ni daŭras la serĉadon

## Venonta estrarkunveno:

Ĵaŭdon, la 11-an de julio 2024 je la 17:00 (16:30 en SA)
Jes ... vi povas partopreni, se vi volas. *Sandor Horvath*

## Esperanta Retradio klaku la bluajn vortojn



Donas bonan Ĉirkau -5 minutan auskultadon kaj legadon Ĉiun tagon
Ne estas facila elekti el la ĉiuj tagaj programoj Do aŭskultu ĉiujn.
BONAJ KAJ MALBONAJ NITRATOJ 28A DE JUNIO 2024 (*ROGER SPRINGER*)





Kara Roger,
vi demandas, kial esperantistoj ne plu portas Esperanto-insignon.
Dum kongresoj ekzemple oni vidas multegajn Esperanto- insignojn, -ĉemizojn, -orelringojn ktp. Tie la portantoj sentas sin en amika rondo.
Sed rilate al la ĉiutaga vivo la afero estas alia. Laŭ mia sperto la plej multaj homoj simple hontas montri al la ekstera mondo, ke ili estas esperantistoj.
Kompreneble ekzistas ankaŭ la aliaj, sed ili bedaŭrinde estas minoritato.
Laŭdindan escepton mi renkontis antaŭ iom da tempo en Elsinoro, kiam mi al amiko el Israelo montris la kastelon Kronborg kaj la urbcentron de Elsinoro. Li surhavis t-ĉemizon kun longdistance legebla slogano pri Esperanto.



Amike, *Peter Weide*

Saluton al ĉiuj geamikoj en mia dua hejmlando!
Dankante pro la belaj fotoj de amikoj esperantistaj en Aŭstralio
mi povas informi vin ke post la forpaso de Alan, mi nun pasigas bonan someron por plani pluajn jarojn de mia propra vivo.
Mi ĉeestis Britan Esperanto-konferencon en Oksfordo kaj nun ĝuas belajn semajnojn kun niaj filoj plej multe saniĝante, ĝardenumante kaj kun familiaj aferoj.
Ekde la venonta jaro tre plaĉos al mi bonvenigi vin ĉi tie en Kembriĝo!



Amikajn bondezirojn al ĉiuj, *Jennifer Bishop*

## On Fri, 28 Jun 2024 at 10:51, Andy Blair <ahblair@yahoo.com> wrote:

**Paralela Universo** estas unu-taga festo de Esperanto, okazanta en diversaj lokoj tra la mondo, la trian sabaton de aŭgusto jare: https://paralelauniverso.com/

Ĉi-jare Paralela Universo okazos la 17a de aŭgusto, kaj estos pli vaste festita ol iam antaŭe: por helpi, bonvolu plusendi ĉi tiun invit-mesaĝon al EO-organizantoj aŭ aktivuloj, kiujn vi konas en via lando.

**Planu eventon kaj afiŝu ĝin**


Eventoj estas en-personaj (*ne* virtualaj) kaj kutime inkluzivos grupan agadon kaj manĝon, daŭrante kelkajn horojn. La celo estas doni al ĉiu Esperantisto, eblecon partopreni sen vojaĝi tro for. Oni povos renkonti novajn (kaj malnovajn) amikojn, kaj fari ĝuindajn memorojn.

Sendu vian eventon al kunordiganto Jed Meltzer (*paralelauniverso@gmail.com*) aŭ afiŝu ĝin al la Google-grupo de *Paralela Universo 2024*: https://groups.google.com/g/paralela-universo-2024

Ne forgesu preni fotojn kaj afiŝu ilin rete, ekzemple sur la PU Facebook-paĝo: https://www.facebook.com/groups/paralelauniverso/ ...aŭ sur la PU Telegram-grupo.

Amike, Andy Blair GEKO+1 902-717-2639 sendis al AE *Heather Heldzingen*

# Daily Chronicles – Sticky – Global South




Rememorigilo, Daily Chronicles kribras la plej gravajn kaj foje interesajn okazaĵojn en nia hodiaŭ mondo. Ĝi ne celas esti superrigardo de 'la ĉiutagaj novaĵoj', ĉar la elekto estas direkte al tiuj temoj kiuj havas la potencialon ŝanĝi nian mondon. Ni estas en mondoŝanĝiĝantaj tempoj. "Ni havas genocidan imperion por faligi kaj multpolusan mondon por konstrui en atmosfero de skizofrenio, nescio, nekonscio, konfuzo, avideco, kolero, ĵaluzo, aroganteco." Tamen, ni vidas progreson kvankam ni vidas abismon nuntempe. Nia laboro estas koncentrita al la kontraŭhomaj sistemoj, kiuj devas iri, por esti anstataŭigitaj per pli rektaj kaj honestaj klopodoj celantaj kreskigi manĝaĵojn manĝeblajn, fari honestan komercon, resanigi homojn, vojaĝi, konstrui lokojn en kiuj valoras vivi, krei bonegajn teknologiojn, kaj lerni utilajn aferojn.

# 3ZZZ



Pro la alproksimiĝanta Universala Kongreso en Aruŝo la elsendo de la 1a de julio 2024 estas dediĉita al Afriko .Vi trovos pliajn informojn pri la kongreso kaj pri la milito en NordKivuo Demokrata Respubliko Kongo. Aliaj temoj estas la olimpiaj ludoj kaj la rilato inter Charles IIIa kaj Drakula /Vlad Tepeŝ Franciska

